

NOVEMBRO 2003

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2003:6



Lingvo en Maŭricio  
Språket på Mauritius



**Organ för Svenska Esperantoförbundet**

ISSN 0014-0694  
 Novembro 2003 • 91-a jarkolekto  
 Fondita en 1913

**Redaktion:** Leif Nordenstorm

**Frågor om prenumeration o. dyl.:**  
 Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**E-post:** [nordenstorm@hem.utfors.se](mailto:nordenstorm@hem.utfors.se)

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

**Tryck:** Al-fab-eto, Skövde

**Prenumeration 2004:** 200 kr.  
 Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlems-  
 avgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

**ESPERANTOFÖRBUNDET**

**Adress:** Esperanto-Centro,  
 Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,  
 tel. 08-34 08 00

**E-post:** [sef@esperanto.se](mailto:sef@esperanto.se)  
**Nätsida:** [www.esperanto.se](http://www.esperanto.se)

**Öppettider:** Esperanto-Centro har flexibla öppettider  
 dagtid. Ring i förväg!

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 2004:**  
 Direktansluten medlem 200 kr.  
 Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-  
 der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-  
 rantisters Ungdomsförbund.  
 Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.  
 Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

**ESPERANTOFÖRLAGET**

**Adress:** Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

**Telefon:** 08 - 34 08 00

**Fax:** 08 - 34 08 10

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** [www.esperanto.se/eldona](http://www.esperanto.se/eldona)

**Telefontid:** Samma som Esperanto-Centro Stockholm.  
 Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Styrelsens ordförande:** Agneta Emanuelsson

**Manus till La Espero**

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgränd 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: [nordenstorm@hem.utfors.se](mailto:nordenstorm@hem.utfors.se)

När kommer La Espero 2004

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3/4	15 maj	15 juni
Nr 5	15 augusti	15 september
Nr 6	15 oktober	15 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

**Guo Yueyin**



*Kie vi naskiĝis?*

Mi naskiĝis en 1960 en Tianjin, je 130 kilometroj sudoriente de Pekino en Ĉinio. Ĝi estas la tria plej granda urbo de Ĉinio kun naŭ milionoj da enloĝantoj.

*Kie vi nun loĝas?*

En Örebro.

*Pri kio vi laboras?*

Mi estas duontempe hejmlingva instruisto pri la ĉina kaj duontempe kuiristo en vartejo (*daghem*). Mi iam faras ĉinajn manĝaĵojn, tamen normale svedajn.

En Ĉinio mi estis mekanikisto en universitato kaj helpbibliotekisto en universitato.

*Kiel vi lernis Esperanton?*

Tio okazis en 1984. Mia patro legis anoncon pri kurso. Li registris min sen demandi min, ĉar li sciis ke mi ŝatas lingvojn. Tio estas tipe ĉina kutimo. Patro faras tion, kion li opinias estas bona por la infanoj. Mi tamen estas tre dankema ke li tion faris. Post la kurso mi partoprenis la UK-on en Pekino. Mi estis membro de la Tianjina Esperanto-Asocio kaj membro de ĝia estraro.

*Ĉu vi havas familion?*

En la Pekina Universala Kongreso mi renkontis Puff (mian nunan edzinon). Post la kongreso ni komencis skribi leterojn unu al la alia. En 1989 ni geedziĝis en Ĉinio. Ni loĝis tie dum 8-9 monatoj, kaj poste translokiĝis al Svedio.

Ni havas du filojn, kiuj komencis lerni Espeanton.

*Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?*

Kompare kun la tempo en Ĉinio mi ne estas tre aktiva. Mi estis prezidanto de la Esperanto-Klubo de Bergslagen. Mi ofte estas en Esperanto-Domo, kaj partoprenas aranĝojn tie.

*Ĉu vi havas aliajn interesojn krom Esperanton?*

Mi interesiĝas pri muziko, sporto, literaturo, scienco, lingvoj k.t.p. Mi tradukis sciencan literaturon i.a. pri optiko kaj fiziko de la angla al la ĉina.

*Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?*

Mi loĝas jam 13 jaroj en Svedio. Mi estas feliĉa kaj havas laboron. Ĉiun duan jaron mi iras al Ĉinio kun mia familio.

Intervjuis: **Leif Nordenstorm**



# Kelkaj noticoj pri UK en Gotenburgo

*Universala Kongreso estas grava evento en Esperantio. Ni kolektis kelkajn noticojn pri la kongreso el diversaj fontoj, ĉefe el la Gotenburgo Inter-Ligilo. Bedaŭrinde La Espero verŝajne ankoraŭ maltrafis multon. Do, verku!*

La ekskursiva fako estis tre sukcesa: oni vendis ĉ. 1800 ekskursivajn biletojn.

Nacia Vespero estis bazita sur "La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson tra Svedio" de Selma Lagerlöf (libro aperinta en Esperanto antaŭ nelonge, eldonita de la eldonejo Fonto en Brazilo). Al la publiko oni prezentis scenojn kaj muzikon el diversaj provincoj kaj tempoj. (Kal & Ada ankaŭ aperis, kompreneble.) Ĉion kuntenis granda surekrana bildoprezento farita de Andreas Nordström, kaj la prezentantoj Siv Burell kaj Lars Forsman. La sveda ensemble konsistis el ĉ. 70 personoj.

Internacia Vespero estas kultura programo en kiu partoprenas artistoj kiuj estas kongresanoj. Reĝisoro de la ĉi-jara Internacia Vespero estis Franz-Georg Rössler, muzikisto kaj komponisto. Unu el la multaj programoj estis nova kanto lia, "Kongreso en Gotenburgo", en leĝera stilo por trivoĉa miksitaj horo kaj fluto kun pianakompano.

En numero de inter-LIGILO oni povis legi anoncon de Svensk Mässbemanning, kiu serĉis Esperanto-parolantajn laborantojn por la kongreso. Bedaŭrinde tiu dungado ne efektiviĝis, pro nekonataj kaŭzoj. La oficistoj de la kongresejo parolis svede kaj angle. Tamen, la kongresejaj oficistoj kiuj deĵoris dum UK estis tre afablaj, kaj al la kongresanoj kaj al funkciuloj, kaj lernis kelkajn Esperantajn frazojn por povi afable saluti.

Komitato de UEA kunsidis en pleno dum sume preskaŭ 9 horoj, kaj dum diversaj pli malgrandaj kunsidoj en la t.n. subkomitatoj (laborgrupoj pri difinitaj kampoj, kiel Financo kaj administrado, Kulturo, Eksteraj rilatoj, Informado, k.a.). Dum la kunsidoj okazis ioma kritiko al la nuna UEA-estraro, sed ne tiel forta kiel oni povintus antaŭvidi. Komitato aprobis proponon de la estraro uzi ĝis 300 000 eŭrojn de la kapitalo de UEA por renovigi kaj plibonigi la domon de Centra Oficejo en Roterdamo. Estis decidite, ke la administraj funkcioj de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Or-

ganizo) (kiu estas parto de UEA) estu prizorgataj de oficisto ĉe CO (laboro antaŭe farita de volontulaj estraranoj de TEJO).

Kongresa Kuriero nomiĝis la dumkongresa ĵurnalo en A3-formato, kiu ĉiutage informis la kongresanojn pri okazintaj kaj okazontaj aferoj. Redaktis ĝin Franko Luin. Kal & Ada-ŝerco estis ĉiutaga ero de Kuriero. Verkis artikolojn diversaj personoj, inter ili Dafydd ap Fergus, nia movada informisto el Bruselo.

<http://uk-2003.net> estis (kaj estas) la adreso de Virtuala Kongresejo de la 88-a UK. Tie aperadis la noticoj kiuj ankaŭ ektriviĝis papere en Kuriero. Tie troveblis la kongresa programo por ĉiu tago kaj ĝeneralaj informoj pri UK kaj pri la kongreslando.

Novajo ĉi-jara estis la ebleco sendi mesaĝojn al la kongresanoj dum la kongreso: eblis sendi retmesaĝon al specifa retadreso dumkongresa [kongresa numero]@uk-2003.net. La mesaĝo surpaperiĝis kaj portiĝis al la ĝiĉeto Rendevua Tabulo, kie ĉiu kongresano povis serĉi sian numeron kaj ricevi mesaĝon. Laŭ Janko Luin, helpanto pri Virtuala Kongresejo, la servo estis "viktimo de sia propra sukceso": ĉiutage alvenis centoj da tiaj mesaĝoj. Li devis malfunkciigi la servon dum la ekskursiva tago (merkredo) por ke la elektronika poŝtkesto ne superŝutiĝu.

Jarlibro de UEA ja normale dissendiĝas al la UEA-membroj komence de julio. Ĉi-jare, pro malbona funkciado de Centra Oficejo, Jarlibro pretiĝis ne en Roterdamo sed en Slovakio fare de Stano Marchek, redaktoro de la revuo Esperanto. Jarlibro estis preta ĵus antaŭ la kongreso, kaj dumkongrese ĉeestantaj UEA-membroj povis ricevi ĝin enmane.

Ekspozicio farita de Esperanto en Väsby troviĝis en la biblioteko de Hisingers-Backa komence de junio, kaj poste en la kulturdomo Blå Stället ĉe Angereds Centrum de la mezo de junio ĝis la 31-a de Aŭgusto.

En la Urba Biblioteko ĉe Götaplatzen troviĝis eta ekspozicio en vitroŝranko ĉe la enirejo kaj en granda angulo en la unua etaĝo (ĉe la fako pri sociaj demandoj, apud bretaroj kun vojaĝolibroj). Tiujn ekspoziciojn faris Anita Dagmarsdotter kaj Soli Lidén. Krome ja troviĝis la konstanta ekspozicieto de E-libroj en la dua etaĝo (prizorgata de Inga Johanson).

## La amaskomunikila kongreso

En sia parolado dum la ferma ceremonio de UK Ivo Osibov, sekretario de UEA, nomis ĉi tiun UK "la amaskomunikiloj por la kongreso estis nekutime granda. Dum la semajno kelkaj televiziaj ĵurnalistoj (de SVT2, de la germana-franca kanalo Arte, k.a.) filmis en la kongresejo kaj intervjuis kongresanojn.

La unua artikolo pri UK aperis en majo (Mässans Tidning), la dua 2003-06-14 (Södra Dalarnes Tidning). Ondo da artikoloj pri UK komenciĝis en 2003-07-20, unue pro du artikoloj de la novaj agentejoj Tidningarnas Telegrambyrå (instigitaj de Bengt Nordlöf), due pro partopreno en la gazetara kampanjo de BKC. Brusela Komunikaĉ-Centro (la E-informada fako de Europa Esperanto-Unio) kunordigis gazetaran kampanjon okaze de UK. La kampanjo celis elektitajn lokajn gazetojn, por igi ilin intervjui partoprenontojn de UK. (Laŭ takso de BKC ĝia kampanjo kaŭzis, ke ĉ. 10 milionoj da gazet-legantoj, en multaj landoj, povis legi pri Esperanto en "sia" gazeto. Kompreneble la svedaj kampanjoj estis nur malgranda parto de tio.) Mankas loko ĉi-tie por listo de gazet-artikoloj en Svedio. Krome estis programoj en svedaj radio kaj televido.

Lokaj amaskomunikiloj: La gotenbarga versio de Metro havis pli ol 1/2 paĝo pri UK la 25-an de julio; Göteborgs-Posten aperigis tri artikolojn, el kiuj unu estis duonpaĝa, kun pria notico sur la unua paĝo (27-an de julio). Göteborgs-Tidningen havis intervjuon kun Kim Henriksen, ano de la rokggrupo Esperanto Desperado, la 30-an de julio, samtage kiel E-rokkoncerto en Jazzhuset. Radio Göteborg havis 7-minutan programon pri UK la 25-an de julio. (Postrikolto de UK estis artikolo en Metro la 29-an de aŭgusto pri Esperantoplatsen.)

En radio: "Efter 3" en P4 havis 5-minutan eron pri UK la 25-an de julio. Samtage ĵurnalista de la ĉiuhora novaĵprogramo Dagens Eko faris intervjuojn en la kongresejo. Språket, prilingva programo en P1, sendis la 19-an de Aŭgusto 14-minutan eron pri UK, kun intervjuoj kun kelkaj kongresanoj, i.a. Christer Kiselman.



# La Maŭricia kreola lingvo

*Kadre de la Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznan, Pollando, mi skribis eseon pri la kreola lingvo de la insulo Maŭricio, kiun Ann-Louise Åkerlund vizitis en marto 2003. Povus esti interese por pli granda publiko scii iom pri tiu paradiza insulo. Ĉi-sube ŝi mallongigis la tekston kaj forprenis kelkajn partojn de ĝi.*

## Pri piĝinoj kaj kreoloj ĝenerale

Piĝinoj kaj kreoloj estas ekzemploj de naturaj interlingvoj, kiuj ekestis el praktikaj interkomprenigaj bezonoj. Troviĝas pli ol 150 vivantaj piĝinoj kaj kreoloj en la mondo hodiaŭ. Ili evoluis precipe en koloniitaj teritorioj, kien venis sklavoj de diversaj popoloj kaj triboj, kun tre malsamaj lingvoj. Por interkompreniĝi inter si mem kaj kun la mastroj ili devis lerni iom de la lingvo de la koloniistoj. Pro tio, la piĝinaj kaj kreolaj lingvoj plejofte baziĝas sur la angla, la franca, la portugala aŭ la hispana.

Piĝino estas interkomprenigilo kun simpligita gramatiko kaj reduktita vortaro. Se la piĝina lingvo fariĝas uzata ankaŭ en la ĉiu-taga vivo kaj la infanoj lernas ĝin kiel sia gepatra, ĝia vortaro kreskas, ĝia gramatiko stabiligigas kaj ĝi evoluas al kreola lingvo.

Laŭ lingvistika vidpunkto 'kreola lingvo' unue signifis "lingva vario, evoluita kaj uzita en kolonio". Nur lastatempe establiĝis la signifo "piĝino, kiu disvolviĝis al gepatra lingvo de iu etna grupo".

La gramatiko de kreola lingvo kaj grandaj partoj de ĝia vortostoko multe diferenciĝas disde la eŭropa lingvo, kiu donis al ĝi ĝian vortprovizon. La gramatiko de diversaj kreolaj lingvoj similas unu la alian, sed malsimilas al la eŭropaj lingvoj.

## La historio de Maŭricio

Maŭricio estas vulkana insulo situanta en la Hinda Oceano oriente de Madagaskaro. Ĝi estas larĝa je 1 860 kvadrataj kilometroj kaj havas – kune kun la najbara insulo Rodrigues – ĉirkaŭ 1.2 milionon da enloĝantoj. Preskaŭ 70 % en ili estas hinddevenaj.

Ne estis indiĝena loĝantaro sur la insuloj, do ĉiuj maŭricianoj estas posteuloj de enmigrintoj, kiuj alvenis dum la lastaj tri jarcentoj – el Francio, Ĉinio, Afriko, Madagaskaro kaj diversaj partoj de Hindio.

La araboj kiel la unuaj utiligis la insulon por replenigi siajn stokojn de nutraĵoj kaj akvo, la portugaloj "malkovris" ĝin en la jaro 1505 kaj la nederlandanoj dum la 17a jarcento komencis kolonii ĝin. Uraganoj, senpluveco, malsanoj, pereoj de ŝipoj, apero de piratoj kaj forkuro de sklavoj tamen devigis ilin forlasi la projekton. En 1715 venis la francoj kaj okupis la insulon favore al la Franca Orientindia Kompanio. Nur en 1721 koloniistoj ekloĝis tie kaj komencis transformi la sovaĝan, nekulturatan insulon al prospera franca kolonio.

La britoj avide alrigardis la strategie situantan insulon, kiel faris ankaŭ marrabistoj kaj piratoj. Tiuj lastaj povis dum la 18a jarcentoj akiri paspermesojn de la francoj se ili promesis ataki nur britajn ŝipojn. Port Louis tiel fariĝis centro por marrabado.

La britoj ricevis Maŭricion kiel kolonion en la pactraktato de 1814. Ili konstruis la lokan ekonomion kaj evoluis la komercon, sed lasis daŭre funkcii la franca reĝimo, jura sistemo, kulturo, religio kaj lingvo, kaj permesis al la posteuloj de la francoj reteni siajn posedaĵojn kaj siajn interesojn en la sukera industrio. La malpermeso de sklaveco kaŭzis problemojn pri laborfortoj kaj oni venigis grandan nombron de hindoj al la insulo. Kvankam ili estis traktataj simile al sklavoj ili sukcesis iom post iom enpenetri aliajn sektorojn de la socio kaj ekonomia vivo. Ili nuntempe estas la plej aktivaj en la politiko de la insulo, kiu en 1968 fariĝis sendependa membro de la Brita Konfederacio. En 1992 ĝi fariĝis respubliko. La 12an de marto ĝi celebras ambaŭ okazintaĵojn.

## La lingva situacio

La oficiala lingvo estas la angla, tamen nur 3 % de la loĝantaro parolas ĝin. La plej vaste uzata lingvo estas la maŭricia kreolo, Kreol Morisyen. Ĝin parolas ĉirkaŭ 600 000 homoj kiel unuan lingvon kaj 200 000 kiel duan.

Aliaj lingvoj estas la hindia (naciilingve: Bhojpuri) kun 330 000 parolantoj, urduo 64 000, la franca 37

000 kaj tamulo 22 000. (Fonto: www.kreol.mu)

La angla estas la lingvo de la parlamento, la lerneja administracio kaj aliaj oficialaj instancoj. La franca estas la lingvo de la amaskomunikiloj. 80 % de la gazetaro uzas la francan, kiu ankaŭ superregas en la reklama branĉo.

En la televido la plejmulto de la programoj estas en la franca, alilingvaj filmoj estas dublitaj en la franca. La loka televido dissendas ĉiun vesperon duonhoran novajelsendon en la angla kaj unufoje semajne filmojn en la angla. Krome la aliaj lingvokomunumoj en la lando havas siajn programojn.

Laŭ mia amikino Claudine Kelly, kiu devenas de Maŭricio sed dum preskaŭ 30 jaroj loĝas en Svedio, ekde proksimume 15 jaroj okazas kreolingvaj klerigaj kaj distraj programoj en radio kaj televido, lastatempe ankaŭ debatoj en la parlamento. Kantisto, kiu prezentas t.n. „protestajn kantojn“ en Kreol, fariĝis tre populara inter la universitataj studentoj.

## Kial Kreol Morisyen ne fariĝis nacia lingvo?

Kvankam Kreol estas la sola lingvo, kiun la plejmulto de la loĝantaro majstras, ili ne volas ke ĝi estu oficiala lingvo. Tio signifas ke la franca kaj la angla regas en la amaskomunikiloj, la edukada sistemo kaj la publika administrado – la franca kiel ĉefa lingvo de kulturo kaj la angla kiel ĉefa lingvo de administrado.

En 1982 la registaro decidis, ke Kreol estu nacia lingvo ĉe la flanko de la angla kaj la franca. La decido vekis fortan kontraŭstaron kaj la projekto devis esti forlasita.

Dum la jaroj 1984-1986 komisiono de parlamentanoj esploris kaj faris raporton pri kiuj lingvoj estu aprobitaj en la ekzamenoj de la bazaj lernejoj. Ili vokis la ĝeneralan publikon doni sian opinion, sed neniam Kreol estis proponata kiel lingvo taŭga por instrui.

En sia laboro de la 1988-a jaro (Eriksen, Thomas Hylland: "Communicating Cultural Difference and Identity. Ethnicity and Nationalism in Mauritius" ĉe www.kreol.mu) Eriksen montras ke la popolo de Maŭricio konsideras la du plej grandaj lingvoj



– la kreola kaj la franca – malsamvaloraj. Per la franca lingvo esprimiĝas klareco kaj solideco kaj “oni ne povas vivi laŭ okcidenta maniero kaj paroli la kreolan”.

## Karakterizoj kaj uzado

Ĝi estas ĉefe parolata lingvo, nur lastatempe ankaŭ skribata. (Tamen, laŭ Claudine jam ekzistis kreollingva gazeto kiam ĝi estis infano.) Ne ekzistas la verbo 'esti', kaj – simile al aliaj kreolaj lingvoj – ĝi ne distingas inter subjektoj kaj objektoj. *Mo marié. Ala mo mari.* (Mi estas edzinigita. Jen mia edzo.)

Specifeco de la maŭricia kreola estas ĝia uzado de enigmoj kaj metaforoj, nomitaj *sirandanes*. En la ttt-ejo [www.kreol.mu](http://www.kreol.mu) mi trovis kolekton de nuntempaj 'sirandanes', inter kiuj pluraj identas kun tradiciaj enigmoj de la 19-a jarcento. Jen kelkaj ekzemploj:

\* *Aswar, mo truv en bann lagrin dan mo laplen. Ler mo lévé mo napli truv zot? – Zétwal.* (En la vespero mi vidas multajn grajnoj en mia ebenaĵo. Kiam mi vekiga, mi jam ne vidas ilin? – La steloj.)

\* *Later blan, lagrin nwar? – Papye samb lékritir.* (Tero blanka, grajnoj nigraj? – Papero kaj skribo.)

\* *Ki ti bouir premyer marmit dan pey Moris? – Difé.* (Kiu boligis la unuan poton en Maŭricio? – La fajro.)

Oni povus rigardi la uzon de enigmoj en plurlingva socio de sklavoj kiel manieron krei komunan lingvon. Ĝi kreas specon de interligiteco kaj interkompreno.

La kreolo de Maŭricio devenas de la franca. Multaj vortoj estas prononcataj same kiel en la franca, malgraŭ ke la literumado malsamas. Aliajn oni malsame prononcas. Oni ekzemple ne uzas la *ʃ*-sonon, kiel en 'bonjour' aŭ 'jeudi'. Anstataŭe oni diras *z: bonzur, zédi*. La *ʃ* fariĝas ordinara *s: santé* (chanter), *kasé* (cacher), *so* (chaud). Krome oni emas mallongigi esprimojn: *zordi* (aujourd'hui), *talère* (à tout à l'heure), *eski* (est-ce qu'il y a).

Genro ne ekzistas en ĉi Maŭricia kreola. La pronomo *li* estas tre uzebla, ne nur por 'li/ŝi' kaj 'lin/ŝin', sed ankaŭ por 'ŝi'. La demonstrativo *sa* estas plifortigita per la vorteto *la* post la substantivo: *sa poisson la* (ce poisson), *sa sapo la paille la* (ce chapeau de paille).

Oni ne fleksas la verbojn, sed mi notis en la frazlibro ke per la vorto *fine* oni povas esprimi pasintan tempojn: *Ou fine gagne laite?* (Vous avez eu du courrier?), *Mo fine perdi mo simain* (J'ai perdu mon chemin). Estontece povus esprimiĝi pere de *pou*: *Dimin mo pou ale la foire* (Morgaŭ mi iros al la foiro).

Ann-Louise Åkerlund

## KRISTANOJ

# Ekumenisk kongreso i Rimini

16-e Ekumeniska Esperanto-kongreson agde rum 30 augusti-6 septembro i Rimini i Italio. (Ekumenisk betyde "samkristen". Katoliker (IKUE) och protestanter (KELI) anordnar alltså en gemensam kongress vissa år. *Reds. anm.*)

Deltagarantalet var 280, övervägande italienska katoliker. Albrecht Kronenberger var sångledare. Den evangeliska gudstjänsten hölls 10.30 i en kyrka.

Den ekumeniska gudstjänsten hölls i den vackra kyrkan intill kongresslokalen kl. 16. Sedan hölls den officiella invigningen i den stora samlingsalen. Tal hölls av biskopen i Rimini, som tolkades till esperanto. Sedan fick en minister hålla ett välkomsttal. Deltagarna kunde sedan komma med hälsningar. Jag var den ende från Norden och kunde då framföra hälsningar från Britta, Mats, Anna, hela den svenska styrelsen samt Karl Buremo och de finska KELI-medlemmarna.

19.30 var det kvällsmat på hotellet. På kvällen hölls en konsert i den stora salongen.

Under måndagen fick vi en förklaring till den vackra mosaiken i kyrkan med text både på italienska och esperanto. Två eller tre olika sammankomster kunde hållas samtidigt i olika lokaler. Tisdagen hade vi en halvdagsutflykt till San Marino i fyra bussar. Den tjeckiska gruppen hade kommit i en buss, fransmän och po-

lacker hade kommit i var sin buss. Kvällsmaten fick vi äta vid buss-hållplatsen, som bestod av en påse med smörgåsar, dricka och en aprikos. Återfärden var kl. 20.

Onsdagen hade vi en heldagsutflykt till Ravenna. 6.30 fick vi frukost, då bussarna skulle avgå 7.30 Vi delades upp i fyra grupper. Vi fick se en kyrka, byggd på 500-talet. Guiden, som tolkades, ville aldrig sluta. Vi måste skynda oss till en katolsk gudstjänst. Protestanterna måste till en mindre evangelisk kyrka, där gudstjänsten leddes av Jaques Tuinder utan musik. Ett 25-tal deltog. Kvällsmaten fick vi äta på hotellet.

Under torsdagen hölls på förmiddagen årsmöten för KELI och IKUE i var sin lokal samtidigt. Katolikerna beslöt att hålla sin kongress nästa år i Litauen, medan KELI skall ha sin kongress i Hostynem i Tjeckien, 31/7 - 7/8 2004.

På eftermiddagen fick jag hålla mitt föredrag om Den heliga Birgitta.

Fredagskvällen var det avsked. De tjeckiska flickorna, nationalklädda, framförde en komedi, sjöng och spelade på flöjt. Nybörjarna fick också läsa något på esperanto.

Avskedet var på lördag morgon efter en ekumenisk gudstjänst.

Arne Lundkvist

## Dankon el Latvio

El Riga mi ricevis leteron de mia amiko sinjoro Jazeps Slars, kiun mi antaŭe atentigis pri la virtuala UK por nekongresanoj. I.a. li skribis:

“Mi virtuale partoprenis UK-on. Spirite kune veturis ekskurson al Vestergotio, al la Skara Katedralo, ĉar pli frue mi ricevis de Vi belegan Libron pri menciita Katedralo. Unuvorte vi svedoj - bravuloj. Vi kiel la unuaj aranĝis eblecon virtuale partopreni Kongreson, dank' al grandega laboro flanke de Franko Luin. Eĉ sukcesis organizi kontaktojn kun iu ajn kongresano ktp.”

Kerstin Kristoferson, Skara



## Tra la mondo per Esperanto petveture

Sergej Chikachev el urbo Magadano, Rusio faras ĉirkaŭmondan vojaĝon per Esperanto petveture. Sergej eliris el Magadano la 5-an de aŭgusto 2003 kaj jam faris 9000 kilometran marŝon nur petveturante, tute sen mono! Nun li venis al Ekaterinburg kaj planas atingi Moskvon, poste tra Kartvelio kaj Armenio al Irako, Irano, Pakistano, Afganio, Hindio, tra la tuta Afriko. El Kejptaŭno li planas veni al Suda Ameriko; tra la Centra Ameriko, Kubo al Usono, Kanado, Alasko kaj reen al Magadano, Rusio... Tra la tuta vojo li uzas helpon de 'Pasporta Servo'. Interesitoj skribu al [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru).

## 197 studentoj lernas en Dankook

En la dua semestro de kuranta jaro, sume 197 gestudentoj lernas Esperanton en la Universitato Dankook, kiu havas du universitatajn terenojn en Seulo kaj C'onan, Koreio. La leciono Esperanto estas oficiala lerno-objekto kun du notoj dum unu semestro. La kurso firme enradikiĝis en la universitato pro varma aliĝo de la studentoj, kiuj havas interson pri Esperanto. Tiuj, kiuj volas korespondi kun ili, bv., lasu vian korespondepton en hejmpaĝo, [www.esperanto.co.kr](http://www.esperanto.co.kr). (ĉambro-nomo: Libera-skribo)

## Sagao de Njal en Esperanto

Sagao de Njal apartenas al la tiel nomataj Islandanaj Sagaoj, verkitaj de nekonataj aŭtoroj en la 13a jarcento. La sagaoj estas prozaj rakontoj pri eventoj okazantaj ekde la fino de la 9a jarcento ĝis la komenco de la 11a. Tiuj eventoj havas historian bazon, sed la aŭtoroj pritraktis la temon artisme, tiel ke oni povas rigardi la sagaojn kiel historiajn romanojn, tamen realismajn. Al aliaj tradukoj nun aldoniĝis la Esperanto-versio tradukita de Baldur Ragnarsson. Ĝi estas konsiderata unu el la cent plej bonaj fikciaj verkoj el la monda literaturo.

## Interlingvistiko kaj kulturo en Pollando

Jam la tria sesio pasis de la trijaraj interlingvistikaj studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznan, Pollando. Estis semajno plena de ekzamenoj kaj prelegoj, de la naŭa matene ĝis la sesa vespere.

Vilmos Benczik prelegis pri la socia kaj estetika fono de la esperanta literaturo, pri modernismo kaj postmodernismo, pri la influoj de la gravaj historiaj eventoj sur la verkoj de la tiel nomata "tria periodo" (de la dua mondmilito ĝis la 90-aj jaroj). S-ro Benczik tre vigle rakontis pri la plej elstaraj verkistoj, el kiuj li persone konis plurajn. Li vere instigis min studi la literaturon de tiu periodo.

Ĉe Vera Barandovska-Frank ni konatiĝis kun aro da latinidaj planlingvoj, kiel Latino sine flexione, Occidental, Novial, Interlingua, Idiom Neutral kaj Ido. Detlev kaj Vera Blanke parolis pri terminologio kaj Esperanto kiel faka lingvo, kaj prezentis kelkajn elstarajn lingvistojn kiel Wilhelm Ostwald kaj Eugen Wüster.

Aliaj prelegantoj estis Ilona Koutny pri esperanta sintakso kaj Blazio Wacha pri semantiko kaj leksikologio.

La studojn partoprenas gestudentoj diversaĝaj kaj el pluraj landoj: Aŭstrio, Belgio, Francio, Germanio, Hungario, Irano, Litovio, Pollando, Svedio... Kelkaj el ili povas partopreni dank'al stipendioj de ESF (Esperantic Studies Foundation). El la antaŭa grupo dum tiu ĉi sesio Jitka Skalicka (Ĉeĥio) defendis sian diplomlaboraĵon "La konceptoj de universala lingvo kaj rilataj nocioj en ĉeĥaj enciklopedioj kaj vortaroj: interlingvistiko".

Kiel kutime la semajno finiĝis per la kultura aranĝo Arkones (ARTaj KONfrontoj en ESperanto), kie kaj la geinstruantoj kaj la gestudentoj prezentigis per prelegoj aŭ muziko. Birke Dockhorn kaj Bertilo Wennergren per fluto, gitaro kaj kantado belege interpretis polajn kaj svedajn kantojn – interalie "La balado pri Frederiko kaj la juna Cecilia Lind". Fabrice Morandeaŭ kun sia akordeono preferas pli "maldecajn" kantojn, ekzemple "La kondomoj de l'timema Tom", al kiu li mem verkis la muzikon.

La programo estis tre varia – de "Primovada panel-diskuto pri Esperantaj mitoj" kaj "La metafora uzo de la lingvo-nomo 'Esperanto' en la li-

teraturaj tekstoj" (Detlev Blanke) tra sceneja prezento "Tra" far Jarlo Martelmonto kaj prezentado de teatraĵoj verkitaj de Stefan MacGill far juna grupo TEATRO INSTIGO el Gorzów Wlkp, ĝis koncerto de industria rokmuziko kun "performanco" far la grupo KRIO DE MORTO el Poznan. Nia profesoro Vera Barandovska-Frank prezentis "Magiajn eldirojn de Harry Potter en lingvistika analizo". Tion ĉi faris en vere bonhumora maniero, vestita kiel sorĉistino kun balailo kaj magia bastono.

Entute la semajno en aŭtune ora Poznan estis interesa, inspira kaj instiga.

Ann-Louise Åkerlund

## Al Svedaj esperantistoj

En la nomo de la Tanzaniaj esperantistoj kaj de mi mem, mi volas esprimi mian sinceran kunsenton al la parencoj kaj kolegoj de ministrino Anna Lindh kaj al la tuta sveda popolo.

Mi kiu estas tre proksima al svedoj kaj svedo estante mia amata eŭropa lando la mizera morto de la ministrino ege tuŝas min. Ŝia morto estas terure tuŝa sed mi kredas, ke svedoj restos trankvilaj dum tiu malfacila tempo.

Estante for de tie fizike mi estas proksime sente!

Costantine Mashauri  
Tanzanio



**DONACOJ**

**RONDO LANGLET**

Ĉiujmonataj donacoj: Ingrid Göransson, Kalmar 200 kr; Leif Nordenstorm, Boden, 150 kr; Lenart Sundman, Västerås, 100 kr; Göran Lundgren, Stockholm, 100 kr; Tore Johansson, Kalmar, 100 kr; Signhild Johansson, Kalmar, 100 kr; Börje Andersson, Skövde, 100 kr; Ingrid Östlund, Västerås, 100 kr; Bengt Nordlöf, Stockholm, 84 kr; Sten Anders Hannerz, Skotgås, 84 kr; Wim Posthuma, Västerås, 50 kr.

Se vi volas aliĝi al Rondo Langlet, kontaktu la SEF-kasiston Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-412205, e-poŝto: freds@artech.se

**CETERAJ DONACOJ**

Ulla Luin, Tyresö, 2800 kr.

**MEMORE AL Olle Olsson**

Karin Lindquist, Malmö, 100 kr  
Gertrud Lund, Malmö, 100 kr  
Herbert Lindros, Ljungby, 100 kr  
Ulla Ullfors, Ystad, 100 kr

SEF kore dankas por la donacoj. Novaĵ estas bonvenaj al pĝ. 2012-3.

**Pli pri Internacia Junulara Kongreso**

En mia memoro IJK-2003 en Lesjöfors ekmemoras per sia bonega sveda somero kaj reala sveda Pipi Ŝtrumpolonga :-), kaj muzikoj kaj kantoj de ĵomart kaj Nataŝa, Bertilo, Dolcĉamar kaj aliaj.

Do, por mi tio estis unua Esperanto-kongreso, cetere, kiel kaj por multaj aliaj ankaŭ. Kiel poste mi ekkonis. La IJKon vizitis proksimume 300 homojn de proksimume 30 landoj. Mi prezentis mian hejmlandon - Respubliko Kazahio.

E-Movado funkciis iam ajn en Kazahio, kiam ĝi estis parto de Sovetunio, sed post Aŭgusta puĉo de 1991 j., kiam malbonigis sociala, ekonomia kaj politika situacio en regiono, la movado ĉesis ekzisti.

La ideo renaski E-movadon en Kazahio enkapis min kelkajn jarojn antaŭe kaj mi provis trovi ĝisnunajn esperantistojn por proponi al ili unuigi niajn povojn por la afero. Kaj mia vizito al IJK-2003 estis la sama prova paŝo al vojo de renaskiĝo de eksintaj kaj establo de novaj ligoj kun esperantistoj de aliaj landoj.

Dank'al organizantoj kaj ilia intereso programo mi bone pasigis la tempon kaj povis renkontiĝi kun multaj interesaj homoj de monda E-movado. Mi revenis hejmen kun multaj ideoj, kaj nun mi organizas E-klubon espere, ke venontajara IJK vizitos pli multe partoprenantojn de Kazahio. Ĉio estis bonege kaj grandioze en la IJK. Uzado de Esperanto estas pluredra. Interparolinte kun homoj de diversaj landoj kaj diversaj aĝoj mi konstatis, ke Esperanto vivas kaj vivos!

Mi dezirus vidi ĉiujn, kiuj ĉeestis ĉi-jaran IJK-on, kaj multaj novajn homojn en IJK-2004 en Rusio. Ĝis la revido!

**Vjaĉeslav Nasretdinov**  
Ŝimkent, Kazahio

**Librofoiro 25-28 Septembro**

Esperanto-Societo de Gotenburgo, kune kun Eldona Societo Esperanto, ankaŭ ĉi-jare partoprenis la svedian Librofoiron en Svenska Mässan, Gotenburgo 25-28 septembro. (La foiro okazos unu etaĝon sub la ĉi-jara UK-

ejo. Lastjare partoprenis la foiron 793 ekspoziciantoj; la suma nombro de vizitintoj estis 110 000.) Ni faris reklamon por la nova eldono de "Nemeza", antaŭe forgesita kaj kaŝita dramo de Alfred Nobel, por du svedlingvaj libroj pri Esperanto, kaj por lerniloj kaj diversaj E-lingvaj libroj.

**Universitata simpozio**

Svedaj universitatoj estas en la praktiko dulingvaj: la sveda kaj la angla estas la ununuraj lingvoj kiujn ĉiu universitatano svedia devas scipovi. Eĉ "grandaj" lingvoj kiel la franca, germana, hispana ktp uzatas nur ene de la respektivaj departamentoj (pri latinidaj lingvoj, pri la germana lingvo, ktp.). En la baza edukado la sveda estas prelega lingvo, sed oni ofte uzas anglalingvaj kurslibrojn jam ekde la unua semestro. La grado de anglalingviĝo varias laŭ la fakoj: en natursciencoj la angla ĝenerale pli fortas ol en humanismaj sciencoj. Ne eblas labori en universitata medio sen scipovo de la angla.

En tiu medio okazis simpozio 2-3 agosto pri interkultura komunikado, en Humanisten, domo de la humanisma fakultato de la gotenburga universitato. Akademio de Esperanto aranĝis la simpozion, kunlabore kun profesoroj Sture Allén kaj Sven-Göran Malmgren de la gotenburga universitato. La simpozio havis financon subtenon de la Sveda Akademio. Ĉeforganizanto estis profesoro Christer Kiselman, vic-prezidanto de Akademio de Esperanto.

La programo estis kutima por ĉi tiaj sciencaj konferencoj: sinsekvo da prelegoj kun postaj demandoj al la preleginto kaj diskuto pri la temo. La lingva aranĝo tamen estis nekutima: prelegoj okazis aŭ en Esperanto aŭ en la angla, sen traduko en la alian lingvon, sed estis tradukado de la diskutoj kiuj sekvis ĉiun prelegon. (Tiu tradukado bedaŭrinde ne funkciis dum la plejparto de la dua tago.) Ĉiuj ĉeestantoj verŝajne komprenis kaj parolis Esperanton, krom tri personoj: la profesoroj Sture Allén, Sven-Göran Malmgren kaj Lars-Gunnar Andersson, ĉiuj de la departemento pri la sveda lingvo.

La diskutoj postprelegaj estis tre viglaj. Lau mia impresoj la Esperantlingvaj diskutoj estis iom pli viglaj, pli senĝenaj, kaj partoprenis ilin pli da

personoj, ol kiam oni uzis la anglan. (Dum ordinara sciencaj konferencoj troviĝas tendenco, ke la denaskaj parolantoj de la angla parolas pli ol la aliaj; la nedenskuloj ja troviĝas sur fremda tereno.)

Inter la temoj pritraktataj estis: "From 'biskop' to 'daytrader'. Foreign influence on Swedish vocabulary as a result of cross-cultural communication" (Sven-Göran Malmgren); "What makes a language hard?" (Lars-Gunnar Andersson); "Esperanto: La kultura dimensio" (Humphrey Tonkin); "La muziko - ĉu vere internacia lingvo?" (Franz-Georg Rössler). Resumoj de la 11 prelegoj (kaj de unu artikolo prezentita per aŝiŝo) troviĝas ĉe <http://www.math.uu.se/~kiselman/sik2003eo.html>

Profesoro Sture Allén ĉeestis ankaŭ la plejmultajn Esperantlingvaj prelegojn, kaj je la fino de la simpozio li kaj la Sveda Akademio estis dankitaj per librodonaco: la Esperanta traduko de "Sortoteco" de Imre Kertész, la lastjara nobelpremiito pri literaturo. Fine la ĉeestantoj partoprenantoj estis regalataj per vodko farita en Bjälstoko, la naskiĝurbo de Zamenhofo.

**Christer Lörnemark**

**SEJU**

Nova prezidanto estas Daniel Granello, Malmö. Nova vicprezidanto estas Carl Mäsak, Upsalo.

**Fino de fonduso 70+**

Dum pli ol du jaroj membroj de SEF pli ol 70-jaraj havis eblecon aparteni al SEF sen pagi jarkotizon.

Tio ebligis dank' al Fonduso 70+, fondita per donaco de 25000 kr. Poste aliaj membroj aldonis plian monon al la fonduso (dum la pasinta jaro sume 8700 kr.) tiamaniere ke la fonduso kreskis eĉ pli.

Pro tio ke granda parto de la membraro havas pli ol 70 jarojn, la fonduso tamen nun elĉerpiĝis. Do ne plu estas uzi ĝin por senkoste esti membro.

Estis antaŭvidite ke la fonduso povis esti uzata dum du jaroj, sen montriĝis ke la daŭro estis du kaj duona jaroj dank' al la faritaj aldonoj.

**Börje Andersson**



# Naturparkoj kaj media protektado en Svedio

## DEZIRAS KORESPONDI

Mia nomo estas Felix Shkolnik kaj mi volus korespondi kun esperantistoj el via lando, pri kiu mi interesigas.

lom pri mi: mi estas 38 jaraĝa, logas en Israelo kaj okupigas pri profilaktika medicino en regiona filio de ministrejo de sano. Mi estos dankema, se mi ricevos leterojn el via lando. Mia adreso estas jena: Felix Shkolnik, POB 10238 IL-84002 Be'er-Sheva ISRAEL. Retpoŝta adreso: felixsh@hotmail.com

Flegistino en malgranda urbo Krzeszowice proksime al Krakovo. Mi interesigas pri turismo, literaturo, muziko, arto, medicino. Alidja Tabor, ul. Długa 8/10, PL-32-065 Krzeszowice, Pollando.

La intereso pri la naturo kaj la fiero esti enloĝantoj en ege bela lando, montriĝis en la sveda politiko por la unua fojo en 1904. Oni tre fervore volis protekti interesajn partojn kaj erojn de la naturo, ne la normalajn kaj "tedajn". En 1909 fondiĝis la naŭ unuaj naciaj naturparkoj, la plej granda el ili "Stora Sjöfallet". Industria evoluo kaj ekonomia gajno tamen estis multe pli grava ol la naturo, kaj nur post kelkaj jaroj la parkoj estis malgrandigitaj pro ekonomiaj kaŭzoj. En 1921 okazis vigla diskuto pri la ebleco fari leĝojn por protekti la medion, sed tiuj diskutoj cedis, kaj daŭris ĝis la 60aj jaroj ĝis kiam ili estis revigitaj denove.

En la 50aj jaroj komenciĝis scienca esplorado pri la medio kaj la problemoj de troa industriigo, sed nur post la publikigo de la libro "Silenta printempo" de Rachel Carson en 1963, oni povas vere diri ke mediaj problemoj komencis esti agnoskitaj de la ĝenerala socio.

Jam en 1967, inter la unuaj en la tuta mondo, la registara naturprotektita aŭtoritato (la nuna Naturvårdsverket) estis fondita. En la sama jaro ankaŭ la gravaj problemoj de acida pluvo fariĝis granda novaĵo en la plej granda matena gazeto, Dagens Nyheter. Tiaj problemoj estis videblaj unue en Skandinavio, ĉar la grundo ĉi tie estas relative acideca. Acida pluvo ne neutraliĝas kaj tial ĝi kaŭzas ĥemian detruon al kaj naturo kaj homfaritaj konstruaĵoj.

En 1972 okazis en Stokholmo la unua media konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj, la tiel nomata "Limoj al Kresko". Leĝoj por gvidi la socion en pli naturprizorga direkto tamen ne venis. Ankorau la industria kaj ekonomia evoluo estis pli gravaj. Dek jarojn post la konferenco, en la nacia politika elekto en 1982, eblis elekti la nove starigitan Verdajn Partion, sed ĝi ne sukcesis enveni la parlamenton tiam. Pro nekonata kaŭzo, miloj da fokoj mortis ĉirkaŭ la Sveda marbordo en la somero de 1988, kaj tio estis la plej granda signalo pri mediaj problemoj ĝis tiam. Nur post tiu granda "Foka morto", la partio eniris la parlamenton post la elekto nomata "La foka elekto", en septembro la saman jaron. Pro la arda laboro de la mediiŝtoj en la parlamento, ĉiuj aliaj partioj devis adaptiĝi al la nova situacio, kaj

en 1989 la laboro por krei novaj mediaj leĝoj komenciĝis. Sed daŭris ankorau dek jarojn antaŭ ol la nova leĝo estis promulgita. El 15 malnovaj leĝoj koncernaj je naturo, medio, sano, akvouzado ktp estis kreita unu nova kodo. La kialo krei la leĝon kiel kodo, kiu estas jure pli peza ol leĝo, estis ke oni volis montri ke la medio estas same atentinda kiel la privata, civila kaj kriminala juraj kampoj. Tiuj kodoj jam aĝas de pluraj centoj da jaroj, kaj estis historia evento kiam la Media Kodo venis.

Fine de la 90aj jaroj okazis ankaŭ alia laboro en la naturprotektita aŭtoritato. Dum la lastaj jardekoj oni daŭre parolis pri la potencaj minacoj al la medio. Homoj laborantaj pri tiuj demandoj sentis ke la laboro estis senfina kaj malĝojiga. Ne estis vere agrable nur paroli pri minacoj, specife ne kiam la evoluo komencis turni sin en pli bona direkto. La ĝistiamaj 167 minacoj estis redifinitaj en 15 mediaj celoj, inter alie: Vivantaj Arbaroj, Bona Aero, Medio sen toksoj ktp. La celo estas ke Svedio fariĝi ekologie subtenebla nacio plej laste en la jaro 2020.

Svedoj ofte kredas ke ili estas ege diligentaj kaj pli bonaj ol aliaj homoj kaj naciecoj. Ankaŭ en la media kampo ni ofte pensas ke ĉio estas en ordo, kaj ke nur aliaj landoj minacas la medion sed ni fakte ricevis kritikon de diversaj internaciaj instancoj. Arbaroj kovras la plej grandan parton de Svedio, sed ne multe da netuŝitaj lokoj restas. En la tuta lando nur 3,5 procentoj el la arbaro estas protektita, kvankam troviĝas internacia celo protekti minimume 10 procentojn. La plej granda parto el la protektitaj arbaroj, 43 procentoj, troviĝas super la limo de alta monto, kie ĉia kreskado estas malrapida. Nur malpli ol 1 procento estas protektita en la malsupraj partoj, kie kreskas kaj vivas la plej protektindaj specoj de plantoj kaj faŭno. La media kodo jam ne regas tiel bone kiel multaj homoj esperis. Kvankam ke la inaŭguran ĉapitron de la kodo starigas la jenan:

1. homa sano kaj la medio estu protektitaj kontraŭ perfortoj kaj malagrabloj malgraŭ ĉu ili estas kaŭzitaj de malpurigo aŭ de alia okazo
2. valoraj naturaj kaj kulturaj lokoj estu protektitaj kaj prizorgitaj
3. biologia diverseco estu protektita
4. grundo, akvo kaj alia fizika medio

estu uzata por ebligi ekologie subteneblan kaj longedaŭran evoluon el ekologia, sociala, kultura kaj socia vidpunktoj, kaj

5. reuzado kaj reprenado, same kiel alia ŝparemo de materialoj, naturaj valoroj kaj energio estu apogata por starigi bilancon inter la socio kaj la naturo. (mia interpreto)

Montriĝis ke estas malfacile atingi la celon de tiuj belaj vortoj. Malgraŭ la fakto ke la nova kodo signifas ankaŭ ke kvin novaj mediaj tribunaloj estis starigitaj. Sume oni povas diri, ke multe jam okazis en la media kampo, sed, ke multe restas antaŭ la fina venko, de la alia verdaj - la mediaj - celoj.

Stella Lindblom

*Laŭ prelego dum la 88a UK en Gotenburgo*

## Olle Olsson mortis


En oktobro mortis Olle Olsson, Lund en aĝo de 94 jaroj. Li estis honora membro de SEF. Nekrologo venos en venonta numero de La Espero.

## Boomee Kim-Lindblom mortis

9/11 mortis Boomee Kim-Lindblom, edzino de Roland Lindblom kaj tre agema esperantisto. Nekrologo pri ŝiaj agoj en multaj kunteksto venos en sekva numero de La Espero.



## Nytt år - nya förhoppningar



Många firar nyår 31 december andra firar nytt år vid en annan tidpunkt under året.

Vissa firar med stor fest med kända och okända. Andra i stillhet, ensam eller tillsammans med ett antal vänner.

Pessimisten, nytt år – är det något att fira? Allting blir som vanligt, bara krig och elände å så blir man bara äldre.

Optimistens nyår – nu skall vi fira! Allting kommer att bli mycket bättre det gamla tråkiga drar vi ett streck över.

Årstidsväxlingen, dag och natt, jordens rotation fanns före människans ankomst.

Människan uppfann tiden, grunden för stresshulets utveckling... Teknisk utveckling och människans "ha-begär" ökade rotationshastigheten.

Jag måste göra det och det innan... Som levande finns det bara en sak som man måste – att dö.

Pessimistiske esperantisten... varför blir aldrig Esperanto det språk som det var tänkt att bli?

Optimistiske esperantisten... nästa år måste det bli esperantospråkets år!

Vad kan du och jag och alla andra esperantister göra för att göra 2004 till esperantospråkets år – (i Norden)!

Under tiden 2003.12.28 – 2004.01.05 står Esperanto-Gården i Lesjöfors till förfogande för de esperantister som vill förena nytta med nöje! Stanna hela tiden eller en

kortare period, du/ni kan även komma före 28 december.

Nyårsfirande... någon form av knytkalas, deltagarna själva tar med något som de kan laga till och ställa fram på matbordet.

Underhållning... ta med ett glatt humör, instrument, drycker. Det finns, CD-, band- och skivspelare, piano samt bastu!

Genom denna informella träff, där deltagarna själva svarar för maten eller några bildar ett matlag som lagar mat kollektivt, finns möjligheten att hålla kostnaden för vistelsen på en låg nivå.

Logi, eftersom deltagarna samlas för att diskutera Esperanto-Gården som ett objekt för att utveckla esperantorörelsernas samarbete i Norden står en säng till förfogande. Eftersom vi har max 26 rum på Esperanto-Gården kan det bli tal om vandrarhemsboende, beroende på antalet deltagare. Naturligtvis kan du/ni köpa andelar i kooperativet eller ger en gåva till E-G.

Några frågor som kan diskuteras är: esperantokurser, kortkurser (veckoslut), veckokurser, långkurs? I vems regi, Esperanto-Gården, de olika ländernas esperantoförbund (vuxen- och ungdomsförbund) eller... Hur kan man ge information om Esperanto till andra personer? Kan man skapa ett gemensamt informationsmaterial för Norden?

Tycker du/ni att detta låter intressant! Gör en intresseanmälan,

gärna som e-post, senast 2003.11.30! Senast 5 december sänder vi dig en bekräftelse!

Lennart Svensson

Esperanto-Gården, SE-680 96 Lesjöfors, Sverige.

E-post egarden@esperanto.se

Telefon: 0590-30909

### La Espero rättar

Talet, som Louis C. Zaleski-Zamenhof höll vid det högtidliga öppnandet, innehåller ett fel. (La Espero 2003:5, s. 3.) Sista ordet skall vara **konsiderindaj och inte konsiderintaj**. Dessutom är namnet felstavat i rubriken!

La Espero tackar Anita som påpekat felet.


La redaktoro



## ANONCETOJ

Kiu scias ion pri Elsa Nyberg? Mi nur scias ke ŝi dum multaj jaroj loĝis en Boden. Mi renkontis ŝin, kiam miaj gepatroj aĉetis ŝian somerdometon en 1973. Poste ŝi verŝajne loĝis en Bromma. Ŝi verkis poezion en la sveda kaj en Esperanto. Unu el ŝiaj poemoj publikigis en la unua eldono de Esperanta Antologio (ĝi malaperis en la dua). En la sveda ŝi verkis romanon "Det var i gryning-en."

Kiu havas pliajn informojn, ekzemple pri naskiĝloko? Informu al la redaktoro de La Espero.



La Espero represas tri recenzojn el la rusa revuo Ondo de Esperanto. Ni povas konstati ke la kvalito de recenzoj en OdE estas tre alta. Gratulon!

## La plej konata sveda libro

**Selma Lagerlöf. La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson. Tradukis el la sveda Sten Johansson. Chapecó, Brasíliá: Fonto, 2002. 614 p., il.**

Ekleginte, mi deziris kompari la komencajn paĝojn kun la rusa versio, kiun enhavas *Fabeloj de atilandaj verkistoj*. Mi estis surprizita legante, ke la gepatroj de Nils intencas iri al foiro (ne al la preĝejo) kaj taskigas lin legi lernolibron (ne la predikon). La miro malaperis, kiam mi vidis ke ĝin eldonis en 1986 junkomunista eldonejo en Ukrainio. Bonŝance oni honeste indikis, ke estas libera rerakonto, ne traduko.

Ni revenu al la Esperanta eldono. Feliĉe, ĝi enhavas ne nur la tradukon. En la postkommento Sten Johansson enkondukas en la histori-kulturan fonon, analizas la verkon ankaŭ el la lingva aspekto. Mapo kaj klarigoj pri geografiaj nomoj, historiaj kaj aliaj realaĵoj de tiutempa Svedio kompletigas la libron.

Speciala komitato taskigis en 1901 jam famiĝintan verkistino Selma Lagerlöf — eksinstruistino en elementa lernejo — verki por svedaj lernejoj legolibron pri la patrolando. La nobel-premiota verkistino (ŝi ricevis Nobel-premion pri literaturo en 1909 kiel la unua virino) kun helpo de la komitato kolektis grandan materialon sciencan kaj folkloran, studvojaĝis al lokoj, kiujn ŝi ne konis, precipe en la nordo. Ŝi havis ideon prezenti aron da fabelecaj rakontoj, en multaj rolis troloj kaj gigantoj. Nur en 1905 ŝi trovis la manieron kunligi ilin en unuecan tutajon.

Ordinara knabo el Skanio, anseristo ne tre bonkora kaj sufiĉe pigra, transformiĝas al koboldo pro sia malicaĵo. Nils faras mirindan vojaĝon sur la bienansero de sia familio. Kune kun sovaĝaj anseroj li trafugas la tutan Svedion: arbarojn, kampojn, lagojn, ankaŭ urbojn kaj vilaĝojn. Li penetras en la mondon de la folkloro kaj mito, kaj en la nacian historion kaj geografion. La animita spaco de lia vojaĝo — birdoj kaj bestoj — kapablas foje je tute homaj malnoblaĵoj, sed antaŭ ĉio je sindonema helpo de unu al la alia. Vojaĝfabelo por la heroo rezultas edukfabelo. Fine Nils ne nur ricevas sian antaŭan aspekton, sed ankaŭ spertas internan transformiĝon.

Krom la ekscitaj aventuroj de Nils en la verko estas pluraj tavoloj. Abun-

das landokonaj faktoj geografiaj, geologiaj, historiaj k.a. La eduka intenco sentiĝas sed ne katenas la verkistinan fantazion.

Ekologia aspekto forte sentiĝas plurloke en la verko. Avertu (des pli aktuala cent jarojn poste) akre sonas en la vortoj de la maljuna anserino: "... la homoj devus ne esti solaj sur la tero. Pripensu, ke vi havas vastan landon kaj ke vi sendube povus oferi kelkajn nudajn ŝerojn kaj malprofundajn lagojn kaj malsekajn torfejojn kaj dezertajn montojn kaj forajn arbarojn por ni malriĉaj bestoj, kie ni povus resti en paco. Dum mia tuta vivo mi estadis ĉasata kaj persekutata. Estas bone scii, ke troviĝas azilo eĉ por tia estaĵo kiel mi."

**Halina Gorecka (Ruslando)**

La Ondo de Esperanto. 2003. 3 (101)

## Dis! De naskiĝo ĝis la lasta stacio

**Sten Johansson. Dis! Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2001. 135 p.**

Sten Johansson en la antaŭparolo nomis sian verkon fikcia. Post la trailego aperas imago, ke la aŭtoro traktas la terminon "fikcia" kiel "ne aŭto-biografia", ĉar la eventoj, agoj, deziroj, pensoj kaj sentoj de la personoj en la romano estas tute realaj, naturaj kaj rekoneblaj. Inkluzive eĉ pensojn kaj sentojn de antaŭnaskiĝonta infano en utero kaj de mortinto antaŭ kremacio.

La romano konsistas el dek tri noveloj, en kiuj estas priskribita la vivo de la protagonisto, rakontanta pri si mem. Estas montrata ordinara (aŭ preskaŭ ordinara) viro, plejparte en la rilatoj amaj kaj amindumaj kun pluraj inoj. Per liaj pensoj, rememoroj kaj revoj respeguligas majstre kaptitaj kaj eble profunde kaŝitaj trajtoj de apartaj homaj karakteroj kaj de la homa naturo esence kaj entute.

Paralele al la novelaro kaj inter la noveloj estas apartaj ĉapitroj kie temas pri pasaĝero, kiu veturas buse de haltejo al haltejo, de unu viva epizodo al alia, de unu rememoro al alia kaj tiel ĝis la vivofino.

Profunda scio de la karakteroj estas nealtrude montrita per aro de etaj ĉiutagaj kaj kutimaj detaloj, priskribitaj kun mola humoro. Kelkaj povas esti preskaŭ aforismoj. "Kiu ĝuo pli grandas — ricevi siajn preferatajn muzikaĵojn, aŭ scii, ke la eksamato ne ricevas la siajn?" (*En fojnamaseto*, pĝ. 16): "Iam ŝi lernis de iu instruisto bonegan argumenton, kiu konvinkis

ŝin pri la malbela de Esperanto. Bedaŭrinde ŝi forgesis la argumenton, tamen ŝi restis konvinkita" (*Subtera eksterlandano*, p. 42). Similaj ekzemploj estas multaj.

En la romano estas ankoraŭ unu linio strukture ne apartigita, tamen rimarkebla. Nome pro tio la protagonisto ne estas tute ordinara persono. Li estas esperantisto devena el la esperantista familio. "...ordinara juna familio, tamen ankaŭ neordinara. Miaj gepatroj estis aktivuloj en la loka Esperanto-klubo..." (*Aprila inundo*, pĝ. 9). La aŭtoro pere de sia heroo montras bonan konon de tiu fenomeno kiun ni kutime nomas Esperanto-movado.

Ĉi tie mi kun grandega plezuro renkontis eksterlandan kolegon kiu same rimarkis kaj kun specifa humuro priskribis tiujn trajtojn de la esperantistoj, kiuj estis rimarkitaj de ni antaŭ dudeko da jaroj en tiam sovetia t.n. junulara Esperanto-movado. Temas, interalie, pri ne troa deziro legi librojn ("Librojn legu la verkisto"); esperantista profesia atributaro — "dormis ... preleganto kun diapozitivoj" (pĝ. 9) (komparu kun *Lumbildit'* de Viktor Sapojnikov); Jonglado per sigloj FIK kaj FEK en titoloj de organizoj (1981j, Omsk, Aleksej Aleksandrov); nunaj aŭ ne nur nunaj fieraj blagoj kaj deklaroj pri kabeado, kiuj restas nur deklaroj ("Kabeiĝos iam mi" de Georgo Handzlik kaj la brua ondo pelata de Jurij Finkel).

Deklari pri io ja estas pli facile ol agi, des pli kabei ĉar Esperanto kiel fenomeno socia estas mistike alloga, certe ne por ĉiuj sed ĝi kapablas kapti kiel mistera *The House Of the Rising Sun*. La aŭtoro lerte kaj sperte priskribas ankaŭ morojn kaj kutimojn en junularaj politikaj rondetoj, kiam interrilato inter, ekzemple, marksismo kaj feminismo rezultis esti... koito, kopulacio — ko to poado laŭ Sten Johansson ("En fojnamaseto", pĝ. 18.). Ankaŭ Esperantaj kluboj kaj rondetoj ne estas esceptoj ("Jen eble la kaŭzo ke la lingva diskriminacio ne ĉesis", pĝ. 22) kaj scii Esperanton ne signifas esti anĝelete ("diferenciĝi de la ceteraj homoj, ne fumante, ne drinkante, sportante k.s.").

La bela kaj flua lingvaĵo de la romano ne impresas kiel klasika Esperanto. La lingvaj eksperimentoj ne mankas, sed la bilanco inter reguloj kaj malreguloj estas akurate gardita, kio refoje montras ke la Lingvo Internacia ne estas dogmo, se oni scias ĝin uzi bone. Tamen aperis amuza demando pri du remiloj, unu el kiuj estas remilo simpla kaj la alia ĝia parulo, ĉu tio estas paŭsaĵo el la sveda



lingvo aŭ la verkisto atribuis al tiuj objektoj inajn kaj virajn trajtojn — simile al homa paro (“al viro farendas, kio farendas al viro”, pĝ. 78)?

Do malgraŭ multaj neologismoj la bezono en zorge kompilita bonega glosaro preskaŭ ne aperas por la okcidenta leganto. La frazoj estas kurtaj, sed esprimivaj, sen troaj klarigoj pezaj. Apartan plezuron donas pluraj kalemburoj: temp' está — venis tempo dum tempesto; dis-ertacio — defendenda scienca tezo pri disigo.

Kaj laste kelkaj vortoj pri la kovrilpaĝo. Ĝi dise malharmonias kaj malkoincidas kun la esenco de la verko. Kiom fajna estas la lingvaĵo, trafikaj rimarkigoj, molaj kaj saĝaj humuraĵoj, tiom malalloga estas la bildo sur la kovrilpaĝo, kie du nebelaj, nejunaj kaj malsimpatiaj inoj pozas nenature kaj imitas penon trapanetri en pantalonon de iu ulo, kies supra korp parto estas ekster la foto. Eble la eldonejo per tio celis substreki la titolon *Dis!* (dis-harmonia, dis-koincida)? Aŭ tio estas ilustraĵo por la 11a novelo (*Du inoj enlite*)? Lastokaze tio plene ne taŭgas, ĉar la novelo kun tia elvoka titolo havas tute korektan kaj molan enhavon.

Se la eldonejo per tia malmodeste provoka bildo penis allogi la legantojn, tiam laŭ mi, ili faris eraron. En la unua Balta Esperanto-Forumo (Kalinograd, julio 2002) en la seminario pri literatura kritiko klare evidentiĝis ke ja pasis en la pasintecon la malnova praktiko, laŭ kiu ĉio eldonita en Esperanto estas leginda, legenda kaj akirenda. Nun la leganto igis pli postulema, pli klera (kaj iusence kaprica) pri elekto de libroj kaj revuoj. Tio rilatas eĉ al ekstera aspekto de la libro. Kaj, sekve, kio taŭgas por sekse *zorgitaj* knabetoj, tute povas malefiki al la personoj kleraj kaj sobraj. Kaj malutili al bona aŭtoro.

**Aleksej Birjulín (Ruslando)**

La Ondo de Esperanto. 2002. 12 (98)

## Iom da suno en malvarma akvo

**Tivadar Soros. *Maskerado ĉirkaŭ la morto: Nazimondo en Hungarujo. 2a eld. Rotterdam: UEA, 2001. 318 p., il.***

**Nina Langlet. *Kaoso en Budapeŝto. Tradukis el la sveda Kalle Kniivilä. Varna: Bambu, 2001. 168 p. (Serio Kargo; Vol 3.)***

Rusa verkisto V.Ŝalamov, kiu havis

amaran sperton de mallibero dum la tempo de Stalin, opiniis, ke vivo sub tre pena premo (ekzemple en Stalin-tempa malliberejo) transformas en bruton iun ajn homon. Laŭ li, ekzistas iu sojlo, post kiu la rezistokapablo de individuo rompiĝas. Kaj ĉiuj igas egalaj, t.e. ĉiuj igas malnoblaj.

Juda psikiatro A.Frankl, kiu samtempe kun Ŝalamov havis samteruran sperton de Hitlera neniigejo, faris alian konkludon: la ĉelima (post-sojla) situo akriĝas, akcentas la principan, bazan orientiĝon de la individuo: ĉiuj — la noblaj kaj la malnoblaj — pli hele manifestas sian internan naturon.

Feliĉe la plejparto de la legantaro de *LOdE* ne havas senperan sperton por konsenti aŭ malkonsenti kun unu el la du opinioj. Sed ekzistas kaj transdoneblas al la aliaj la fiksita memoro de martiroj kaj herojoj de la svagaj tempoj de la pasinta jarcento.

Per stranga, feliĉa kaj certe ne hazarda koincido la esperantistoj ricevis ĉi-jare [2001] du dokumentojn de tia speco: en la serio *Kargo* aperis la rememoroj de Nina Langlet pri la faŝista agonio en Hungario, kaj preskaŭ samtempe UEA aperigis libron de Tivadar Soros laŭ la sama temo.

La titoloj de la libroj elokventas: *Kaoso en Budapeŝto* kaj *Maskerado ĉirkaŭ la morto*. Vico da koincidoj kaj paraleloj formas al ni certan intelektan kombinon, kiu tute enlogas la menson kaj donas egan nutron al la imago kaj medito. Nina Langlet (origine Borovko) estas filino de fama rusa pioniro de Esperanto, Nikolaj Borovko. Ŝia edzo, kies nomo entenas anglan aludon, kies pravaĵoj estis francoj, devenas el Svedio. Dum sia juneco li venis Ruslandon, ĉar volis praktiki Esperanton en la lando kie unue ŝi sukcesis vegeti. En 1945 li venis en Hungarion por savi tieajn judojn el nazia araneaĵo. Tiutempe en la sama urbo loĝas kaj faras la saman aferon Tivadar Soros, judo, la patro de la fama financisto George Soros, esperantisto, homo en kies pasinteco ankaŭ estis Ruslando. Ambaŭ — Langlet kaj Soros — eldonis siavice revuojn tre gravajn por la sorto de Esperanto: *Lingvo Internacia* kaj *Literatura Mondo*. Nun ambaŭ en la antaŭmorta haoso de la hitlerismo klopodis “helpi al kiel eble plej multaj”. Oni legu ambaŭ dokumentojn (tiu de N.Langlet tradukita el la sveda, tiu de Soros originale skribita en Esperanto) kaj konsentu: ĝuste tio estis la tempo de maksimuma premo: de tiu, kiu rompas la ostojn kaj eligas la sangon.

Stranga mis sento laboras en mi eĉ hodiaŭ kaj malhelpas kredi la okazintaĵojn, — diras Soros. Tamen oni ne povas dubi, ke tio estas la vero. Fakte, seka, tute ne patosa ekspozico de la faktoj donas tre findandajn tuojn, interferan de ambaŭ aŭtoroj. Ne estas kazo por fari recenzon en la klasika senco de la vorto. Mi ne laŭdos la stilon (kiu tamen estas bona) kaj ne rezonos ĉirkaŭ pluraj menciindaj momentoj: mi nur rimarkigu, ke tiuj du dokumentoj atestas kontraŭ V.Ŝalamov kaj por A.Frankl. En ilia virtuala (fakte, universala) disputo pri la naturo de la homo ja estas tuŝitaj kelkaj bazaj etikaj principoj. Ĉu bono aŭ malbono efektive ekzistas? Kaj se la bono efektive estas realo, kia estas ĝia rezistokapablo? La spertoj de la geedzoj Langlet kaj de T.Soros montas, ke ĝi estas sufiĉe granda por igi konsiderinda faktoro de la vivo. Jes, en tiu surtera infero ĉiu valoro tuj efektiviĝas. N.Langlet detale priskribas la ondon de denuncado, kiu kovris tiaman Hungarion, kaj ĝi donas — aliflanke — amason da ekzemploj de heroismo kaj sinofero.

Tra diversaj homoj (malgraŭ ilia esperantisteco), Langlet kaj Soros, trovas komunan grundon, sur kiu baziĝas io esenca en la individuo. “Grava ja estas homo, ne lia religio, raso aŭ koloro”, — simple konstatas Soros. Kaj plu: “Se leĝoj enkorpiĝas certajn moralajn regulojn, devus esti iuj fundamentaj principoj de la justeco, kiujn neniu ŝtato rajtas malobservi”. Kaj ankoraŭ: “Civitano devas malakcepti maljustecon aŭ arbitrecon, faritan de la ŝtato al kiu li apartenas”. Tiel pravigas sian pozicion T.Soros. Li estas juristo, do scias respekti la leĝojn, kaj li estas pragmata, vere ŝatanta etajn plezurojn de la vivo. Tamen li trovas necesa ribeli, kaj li ne hezitas sekvonte la vojon de la idealisto Langlet. ĉar funde, principe, esence ili ambaŭ estas ne judo kaj kristano, ne advokato kaj ŝtatoficisto, sed homoj, kiel tiuj hungaraj amikoj de unu juda familio, kiuj kudris flavan stelon sur la bruston, kiel signon de solidareco.

La homoj de la ĵus pasinta jarcento ŝokas kaj promesas maltrankvilan futuron. Sed — iom da suno en malvarma akvo — samegale ili donas unu optimisman lecionon: la historion de la homa digno oni povas fini nur kun “la fina solvo”, radikala aranĝo de la homa demando.

Eble onin ĝenas tiu patoso: “digno”, “bono — malbono”. Do legu la librojn, kaj ĉiu mis sento malaperos.

**Alen Kris**

La Ondo de Esperanto. 2002: 1 (87)



# Nej, själv var Alfred Nobel ingen litterär begåvning

Med anledning av Esperantoförslags utgåva av Alfred Nobels drama *Nemesis/Nemeza på svenska och esperanto skriver Vasabladet i Finland om boken. Här är några utdrag ur artikeln:*

Det är nu första gången "Nemesis" trycks i sin helhet på svenska – i en icke indragen upplaga. Upplagan är gjord så att på varje uppslag finns en sida svensk text och en sida text på esperanto. Troligen är det också för-

sta gången "Nemesis" översätts till ett internationellt gångbart språk.

Pjäsen huvudperson, Beatrice Cenci, har funnits i verkligheten och avrättades i Rom 1599. Nobel är inte den enda som konstnärligt behandlat hennes liv. Men det bör nog påpekas att det inte är enbart den katolsk-kritiska problematiken som gjort att pjäsen inte slagit igenom i Nobels fall. Någon stor litterär begåvning var inte Nobel, alltför ofta använder han pjäsen för att få fram sina egna åsikter. Riktigt intressant blir Nobels för-

fattarförsök när vi kombinerar det med hans testamente och anvisningar till vem hans litteraturpris skall delas ut: "den som inom litteraturen producerat det utmärktaste i idealisk riktning". Oenighet har rätt vad han egentligen menar med "idealisk". Ser vi på hans eget verk är det både oppositionistiskt och anarkistiskt, och om Nobel ansåg att priset skulle gå till sina efterföljare, så har nog Svenska Akademien ibland varit ute och cyklat.

Karin Erlandsson

## Prenumerera!

Svenska Esperanto Förbundet erbjuder sina medlemmar att prenumerera på esperantotidningar för 2004. Du beställer tidningarna genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29-5, SEF, specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby, tel. 0415-50152

Tidning	nr/år	pris kr
Brazila Esperantisto	4	120
Esperanta Finnlando	6	135*
Esperanto	11	310
Esperanto Dokumentoj	10	245
Esperanto en Danio	5-6	125*
Fonto	12	285*
Heroldo de Esperanto	17	280
ICEM	4	170
Juna Amiko (rabatt vid mer än 1 ex)	4	110
Komencanto (större nummer)	6	140
Kontakto	6	195
La Hirundo	8-10	150
La Jaro	1	49
La Kancerkliniko	5	190*
La Ondo	11	230
Literatura Foiro	6	260
Litova Stelo	6	130
Monato	11	410
Monato (retversio)		246
Norvega Esperantisto	6	100*
Oomoto	2	100*
Ret-Info		175*
Rok Gazet	1	
	155* (för tre nummer)	
Scienca Revuo	4	190*
TEJO-tutmonde	4	100

Tidningar markerade med \*har inte lämnat prisuppgift för 2004

Nu är det tid att betala UEA-avgiften för år 2004

## UEA behöver dig Du behöver UEA

Ett starkt UEA kan hävda sig bättre i en värld, som idag mer än någonsin behöver ett neutralt språk. Stöd därför UEA med ditt medlemskap.

För din egen del betyder det, att du får UEA:s årsbok med namn och adress på delegater i hundratalet länder, och om du är MA-medlem, får du även tidningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad, som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto.

Ange på talongen vad pengarna avser.

Med vänlig hälsning  
Lisbet Andreasson  
Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby  
tel. 0415-50152

Avgifterna för år 2004 är följande:

Kategori

**MA** Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår! 490 kr

**MJ** Direktmedlem med årsbok. I övrigt se ovan! 200 kr

**MG** Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift. 80 kr

**SZ** Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation.

Ger inte medlemskap i UEA 980 kr

**PT** "Patrono de TEJO", får tidningen Kontakto. 600 kr

**DM** "Dumviva membro" betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken. 12.250 kr

**DMJ** "Dumviva membro kun jarlibro" betalar för hela livet. Får årsboken. 5.000 kr

**DPat** "Dumviva Patrono", betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständig medlem i "Societo Zamenhof". 122.500 kr

**DPT** "Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet och får tidningen Kontakto. 15.000 kr



# Nu är det tid att betala UEA-avgiften för år 2004

## UEA behöver dig - Du behöver UEA

Ett starkt UEA kan hävda sig bättre i en värld, som idag mer än någonsin behöver ett neutralt språk. Stöd därför UEA med ditt medlemskap.

För din egen del betyder det att du får UEA:s årsbok med namn och adress på delegater i hundratalet länder, och om du är MA medlem får du även tid-

ningen Esperanto, som ger dig värdefull information om vad som händer i esperantovärlden. Dessutom ger medlemskapet dig rätt till betydligt lägre kongressavgift.

Du betalar avgiften genom att sätta in pengarna på postgiro 14 74 29-5, SEF specialkonto.

Ange på talongen vad pengarna avser.

Vänlig hälsning

Lisbet Andreasson

Södra Rörum, Husarlyckevägen 29,  
242 94 Hörby, Tfn 0415-50152

### Avgifterna för 2004 är följande:

Kategori		
MA	Direktmedlem med årsbok och tidningen Esperanto. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår!	490 kr
MJ	Direktmedlem med årsbok. Om man är under 30 år blir man automatiskt medlem även i TEJO och får Kontakto. Ange födelseår!	200 kr
MG	Direktmedlem med "Gvidlibro". Ger inte nersatt kongressavgift.	80 kr
SZ	Avgift för "Societo Zamenhof", särskild stödorganisation. Ger inte medlemskap i UEA.	980 kr
PT	"Patrono de TEJO". Får tidningen Kontakto.	600 kr
DM	"Dumviva Membro" betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken.	12.250 kr
DMJ	"Dumviva Membro kun jarlibro" betalar för hela livet. Får årsboken.	5.000 kr
DPat	"Dumviva Patrono" betalar för hela livet. Får tidningen Esperanto och årsboken och blir därtill ständig medlem i "Societo Zamenhof".	122.500 kr
DPT	"Dumviva Patrono de TEJO" betalar för hela livet. Får tidningen Kontakto.	15.000 kr

Bordning 70811



POSTGIROT SVERIGE

Meddelande till betalningsmottagaren **Betalar härmed följande för 2004:**

Kategori	Kronor	Född år
För:		Telefon
Adress:		
Kategori	Kronor	Född år
För:		

Meddelande kan inte lämnas på baksidan

INBETALNING/GIRERING A

Kod 1

Till postgirokonto

14 74 29 - 5

Betalningsmottagare (endast namn)

**SEF Specialkonto**

Avsändare (namn och postadress)

Svenska kronor

öre

Från postgiro-/personkonto (vid girering)

Bl 2021.04-S (jan 97)-45881 01.03 Bordning

#

#

#04#



# Svenska Esperanto-Förbundet

SEF erbjuder dig att prenumerera på esperantotidningar för år 2004.

Du beställer tidningar genom att sätta in pengar på postgiro 14 74 29 - 5, SEF specialkonto, samt att på talongen ange vilka tidningar, som avses.

Vill du fråga något ytterligare kan du göra det hos:

**Lisbet Andreasson**

**Södra Rörum, Husarlyckevägen 29, 242 94 Hörby,**

**Telefon 0415-50152**

Tidning	Nr/år	Pris kr
Brazila Esperantisto	4	120
Esperanta Finnlando	6	*135
Esperanto	11	310
Esperanto-Dokumentoj	10	245
Esperanto en Danio	5-6	*125
Fonto	12	*285
Heroldo	17	280
ICEM	4	170
Juna Amiko (rabatter vid mer än 1 ex)	4	110
Komencanto (större nummer)	6	140
Kontakto	6	195
La Hirundo	8-10	150

Tidning	Nr/år	Pris kr
La Jaro (kalender)	1	49
La Kancerkliniko	5	*190
La Ondo	11	230
Literatura Foiro	6	260
Litova Stelo	6	130
Monato	12	410
Monato, retversio		246
Norvega Esperantisto	6	*100
Oomoto	2	*100
Ret-Info (nästan dagligen, ange e-postadress)		*175
Rok' Gazet (pris för 3 nr)	1	*155
Scienca Revuo	4	*190
TEJO tutmonde	4	100

Tidningar markerade med \* har inte lämnat prisuppgift för år 2004.

## Postgirot

Meddelande till betalningsmottagaren **Följande beställes för 2004:**

Tidning	Pris
	Pris
	Pris
	Pris
Sammanlagd summa	

Telefon nr:

Meddelande kan inte lämnas på baksidan

## INBETALNING/GIRERING A

Kod 1

Till postgirokonto

**14 74 29 - 5**

Betalningsmottagare (endast namn)

**SEF Specialkonto**

Avsändare (namn och postadress)

Svenska kronor

öre

Från postgiro-/personkonto (vid girering)